TEJO-aktuale: numero 363, 2013-07

### Korekto: Karavano al kaj el SES

La ligilo al la aliĝilo estis malĝusta. Jen la ĝusta ligilo:
Informilo: http://www.alesk.eu/karavano/ses2013/

Aliĝilo: https://docs.google.com/forms/d/1JB8x4UEXGiupJ4iymXIlŭgQLQh69NII5e_1jCJdBi8/viewform

### Kontakto: Fotokonkurso de Kontakto

Revuo Kontakto lanĉas fotokonkurson kun la temo: “Mi kaj Kontakto”. La konkurso celas montri la rilaton de niaj legantoj kun la revuo. Por partopreni, faru foton de la revuo en interesaj, kreemaj kaj eĉ nekredeblaj situacioj. Vi povas foti ĝin tuj kiam ĝi alvenas al via poŝtkesto... Legu pli: http://kontakto.tejo.org/2013/06/foto-konkurso-de-kontakto.html

### 8a Foiro pri Edukaj Iloj, 4-9 Novembro 2013, Delphi (Grekujo)

Reprezentu vian landan asocion kaj/aŭ TEJOn en la 8a Foiro pri Edukaj Iloj de SALTO-Youth! Legi pli:
http://tejo.org/eo/node/1502

### Stipendioj por instruista trejnado en Pollando

En septembro 2013 denove startas la unu-jara kurso por tiuj, kiuj interesiĝas pri la instruado de Esperanto. Aliĝu ĝis la 10a de aŭgusto 2013!

La kurso daŭras unu jaron. Oni devas veturi trifoje (septembre 2013, februare kaj denove septembre en 2014) al Poznano en Pollando, por partopreni lecionojn de elstaraj profesoroj kaj ekzameniĝi pri la dumsemestraj lernitaĵoj. En la fino oni ricevos atestilon de UEA kaj ILEI pri la kurso.

Stipendioj atingeblas por la senpaga studado! Ĝis la 10a de julio oni devas kandidatiĝi por povi ricevi stipendion, alikaze la studado estas pagenda je 130 eŭroj semestre. Legu pri la detaloj ĉe http://edukado.net.

### PasportaServo-libreto aperontas. ĝisdatigu viajn informojn

Post unu jaro sen nova eldono, la adreslibro de PS 2013 aperos. Pro tio ni bezonas ĝustajn informojn pri vi! Do ne atendu, ĝisdatigu viajn kontaktinformojn ĉe http://www.pasportaservo.org (vi povas rapide krei konton ĉe http://pasportaservo.org/user/register?destination=ĉefpaĝo), aŭ sendu paperajn aliĝilojn ĝis la 15a de julio se vi ne volas konton ĉe la retejo. Novaj gastigantoj estas ankaŭ tre bonvenaj.

Nepre ne hezitu ankaŭ kontakti helpanton (vidu kontaktinformojn ĉi-sube) aŭ vian landan organizanton. Ne forgesu klarigi ĉu vi volas aperi en la adreslibro (vidu paĝeton "miaj informoj", sekcion "privateco"), kaj kontroli ĉu vi estas markita kiel gastiganto.

Ekde la 5a de julio ĝis la 10a de aŭgusto, la retpaĝo http://www.pasportaservo.org daŭre funkcios, tamen ne plu eblos mem fari ŝanĝojn de datumoj, ĉar dum tiu periodo la datumoj estos reviziataj. Oni nur povos peti ŝanĝojn ĉe helpanto.

Notu, ke por la adreslibro PS 2013 estos uzataj la datumoj validaj je la 5a de julio!

Quentin Weber-Seban, Respondeculo de Pasporta Servo

Kontaktinformoj:

Pasporta Servo: pasportaservo ĉe tejo.org

Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando

Telefono: +31 (0)10 436 10 44

Fakso: +31 (0)10 436 17 51

### La 3a Urba Semajnfino, Santa Cruz, Kalifornio, Usono, 7a ĝis 8a de septembro 2013

La Urba Semajnfino venos al la Pacifiko ĉi-somere! Ĝi okazos en la fama plaĝurbo Santa Cruz, Kalifornio, de la 7a ĝis la 8a de septembro, 2013.

Urbaj Semajnfinoj ne estas tipaj Esperantaj okazaĵoj. La tuta urbo estas la kongresejo, kaj anstataŭ prelegoj, la programo enhavas ekskursojn al multaj farindaĵoj, bongustajn (sed malmultekostajn) restoraciojn, kaj multe da tempo por simple amikumi kun novaj kaj malnovaj amikoj. Ni invitas ĉiujn al US3 je ĉiu ajn nivelo de Esperanto. Legu pli: https://www.facebook.com/events/348487278614272/

### Kultura Semajnfino de Sarlanda Esperanto-Ligo, Homburgo, Sarlando, Germanio, 27-a ĝis 29-a de septembro 2013

La Kulturaj Semajnfinoj de SEL estas aranĝoj kiuj serioze pritraktas kulturajn okazaĵojn. Prelegantoj parolas pri literaturo, aliaj lingvoj, muziko k.t.p. - Bedaŭrinde la partoprenataro pli kaj pli malkreskas pro manko de junuloj. Tial SEL pripensis starigi prelegserion "Antaŭenigi Esperanton per ..." ekz. "la instrumetodo de Andreo Cseh" (Ed Borsboom) aŭ "Vikipedio" (D-rino Niesert) aŭ "mojoseco". Tiu ĉi temo ankoraŭ ne trovis sian preleganton. Ni ŝatus trovi lingve spertan junul(in)on kiu konvinke klarigos kiamaniere kaj memkompreneble modernjunstile oni interesigu aliajn junulojn pri Esperanto, kion oni faru por instigi novulojn kunlabori en la movado kaj kion oni ŝanĝu en la strukturoj de la malnoviĝintaj kluboj. Ni ankaŭ bonvenigus du aŭ pli gejunulojn kiuj pretus sinsekve aŭ komune prelegi pri diversaj temoj. La aranĝo estos en Homburgo (Sarlando, Germanio). Se vi ŝatus kontribui (sole, duope, grupe) bonvolu kontakti nin! La sekvonta Kultura Semajnfino okazos inter la 27-a kaj 29-a de septembro. Legu pli: https://www.facebook.com/Sarlanda.Esperanto.Ligo aŭ http://www.esperanto-saarland.info/

### Rekomenditaj kantoj:

- “Pli ol nenio” de Martin kaj la Talpoj. Rigardu: http://www.youtube.com/watch?v=4nH-j_ZEVGg

- “Imagu” de Stefo (dum FESTO 2009 Zwingenberg). Rigardu: https://www.youtube.com/watch?v=mYIoM5MmKAk

- “Vi kaj Mi” de Ĵomart kaj Nataŝa. Rigardu: http://www.youtube.com/watch?v=X4kJEvLVc0g kaj la ligilo al la Vinilkosma paĝo por elŝuti niajn kantojn: http://www.vinilkosmo-mp3.com/jhomart-natasha-c-76_133.html

### Surprizo! Apero de la albumo "Ĉiamen plu" de LPG pli frue ol planite !

Jam eblas mendi ĝin ekde la 25a de junio 2013 ! Legu pli: http://www.ipernity.com/doc/vinilkosmo/21971927?lg=en&hash=5f9ef7828a06b35fab2363089dcf40ca

### Venontaj renkontiĝoj

Esperanto-kastelo Greziljono, SOMERA programo, 6a de julio ĝis 17a de aŭgusto 2013, http://www.gresillon.org/somero

49-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj en Utena, Litovio, la 6-an ĝis 14-an de Julio 2013, litova.ea ĉe mail.lt aŭ http://www.esperanto.lt

4a Ateliero de FEM, Kultura Centro Esperantista en La Chaŭ-de-Fonds, Svisio, 8a ĝis 13a de julio 2013, http://www.esperantio.net

46a ILEI-KONFERENCO, Herzberg am Harz (urboparto Sieber), Germanio, 12a ĝis 18a de julio 2013, http://ilei-konferenco.esperanto-urbo.de

Somera Esperanto-Studado (SES 2013), Martin, Slovakio, 12a ĝis 20a de julio 2013, http://ses.ikso.net/

Muzika Staĝo, kun Markov-familianoj, KVINPETALO Esperanto-Centro , Julio 12a-18a, informoj ĉe kvinpetalo.org aŭ http://www.kvinpetalo.org

66-a Kongreso de IKUE, Kalwaria Zebrzydowska, Pollando, 13a ĝis la 20a de julio, http://www.ikue.org/kong2013/

Nitobe-simpozio en Rejkjaviko, Islando, 18-20 julio 2013, Humphrey Tonkin (tonkin ĉe hartford.edu)

IEK2013, Saint-Amand-Montrond, Francio, 20a ĝis 26a de julio 2013, http://www.kava-pech.cz/iek

98a Universala Kongreso, Rejkjaviko, Islando, 20a ĝis 27a de julio, http://www.uea.org/kongresoj

Alternativa MOJOSejo, ESPERANTO-KASTELO GREZILJONO, Francio, 20a ĝis 27a de julio 2013, http://gresillon.org/s3

Praktikado de la lingvo (1a nivelo), Rafael Mateos, KVINPETALO Esperanto-Centro, Julio 22a - Julio 26a , informoj ĉe kvinpetalo.org aŭ http://www.kvinpetalo.org

Praktikado de la lingvo (2a nivelo), kun Josée Lafosse, KVINPETALO Esperanto-Centro, Julio 22a - Julio 26a, informoj ĉe kvinpetalo.org aŭ http://www.kvinpetalo.org

86a SAT-Kongreso, Madrido, Hispanio, 28a de julio al 4a de aŭgusto http://satesperanto.org/-2013-86-madrido-.html

Internacia Junularo Semajno 2013, Tiszafüred, Hungario, 1a ĝis 8a de aŭgusto, http://www.ijs.hu/eo

11-a SOMERE - Somera Mezeŭropa Renkontiĝo, en Dahlem-Baasem, regiono Eifel, Germanio, 2a ĝis 10a de aŭgusto, http://www.esperantoland.org/somere/

Itala Kongreso, Kastelaro (Sanremo), Italio, 3a ĝis 10a de aŭgusto, http://kongreso.esperanto.it/80/?lang=eo

63-a Kongreso de KELI, Svitavy, Ĉeĥio, 3a ĝis 10a de aŭgusto, polnicky ĉe quick.cz aŭ cea.polnicky ĉe quick.cz aŭ http://keli.chez.com/Aligilo2013.pdf

46-a Internacia Esperanto-Feriado en Szczawno, Pollando, 5a ĝis 15a de aŭgusto 2013, http://esperanto.wroclaw.pl/, Teresa Pomorska (pomer ĉe wp.pl aŭ pomer ĉe esperanto.wroclaw.pl)

Festa Semajno por infanoj, adoleskantoj, junuloj, familioj eĉ kun beboj kaj geavoj, ESPERANTO-KASTELO GREZILJONO, Francio, 3a ĝis 10a de aŭgusto 2013, http://gresillon.org/s4

FESTO, Kelmis, Amikejo, Belgio, 10a ĝis 17a de aŭgusto, http://alesk.eu/festo2013/

Promeni tra naturo kaj Vikipedio, kun Alain Favre, fungologo, KVINPETALO Esperanto-Centro, Aŭgusto 12a – 17a, informoj ĉe kvinpetalo.org aŭ http://www.kvinpetalo.org

69a Internacia Junulara Kongreso, Nazareto, Israelo, 19a ĝis 26a de aŭgusto, http://www.tejo.org/ijk

23-a KISO en Marburg, Germanio, 19a ĝis la 25a de aŭgusto 2013, http://www.esperanto.de/KISO

Oranĝa renkontiĝo 2013, Hernusando, Svedio, 6a ĝis 15a de septembro 2013, http://www.seju.org/or2013 aŭ https://www.facebook.com/events/607583009256372/

Pliaj renkontiĝoj haveblas en la Internacia Kalendaro: http://www.eventoj.hu